„Kia senhonorulo vi montris vin!“ ŝi ekdiris, kun vangoj flamantaj pro kolero. „Granda ĉielo! Kian elekton proponi al mi — aŭ neparoleblan honton, aŭ mortigon al Henriko!“

Milton staris konsternita. Lia ŝipo, kun sia ŝarĝo de oraj esperoj, ekpereas sub li. Ŝia voĉo incitis lin ĝis furiozeco. La mallumaj okuloj alprenis danĝeran aspekton. La maldikaj lipoj kunpremiĝis en severan kruelan linion. Kun pasia emfazo li alvokis sian Kreinton.

„Dio min juĝu — mi ne mortigus lin,“ li kriis, levante supren la dekstran manon.

Sed li mensogis! Li rimarkis la malfidon, la malestimon en ŝia vizaĝo. Per forta volo li detenis sin. Kvietajn rimedojn unue — flatajn petojn pri favoro, dolĉajn rigardojn, mielajn vortojn pri amo — li provis ĉiujn, kaj provis vane. Ŝi jam forskuis lian magian influon, kvazaŭ influon de danĝera serpento. Rapide, kiel falanta stelo, en tiu nokto neniam forgesebla por ambaŭ, forflugis por ĉiam ŝia ensorĉiteco pri tiu artifikulo!

Ĉu do li devos perdi ŝin? Ne! Milfoje ne! Per brutaĵoj li devigos ŝin edziniĝi kun li.

„Vi intence tentis min!“ li kriis furioze. „Vi ludis kun mi; vi logis min en vian kaptilon. Kaj jam, senkora koketulino, vi ĵetas min flanken, kiel elbrulintan cigaredon. Vi — vi devas edziĝi min.“

Superombrante la kompatindan junulinon, li ripetis, „vi devigite kaj nepre edziniĝos kun mi.“

„Via amo estas tiel falsa, kiel vi mem,“ ŝi diris malestime.

„Vi dividis ĝin kun mi, Sybil“. Lia voĉo gratis per doloro.

„Jes,“ ŝi diris malĝoje, „je mia ĉiama honto!“

Tiam la tro ŝarĝita junulino lasis sin duonsvene fali en seĝon. „Iru for, S-ro Milton,“ ŝi malfacile spiris, „mi ne estas sufiĉe forta por elporti plion. Mi volas neniam plu vidi vian vizaĝon!“

La subpastro foriris.

Tiel la paroĥestro, tiu kompatinda izolita animo, triumfis per sia morto.

Kun permeso de l' aŭtoro el la angla lingvo tradukis
W. W. Padfield (I. U. E. V.)

La rezultato de nia konkurso el No. 4B.

Ne multaj samideanoj respondis nian alvokon. Ĉu la temo, pro la memverkado, estis tro malfacila, ĉu ne okazas multaj interesaj aferoj en Esperantujo, tion ni ne povas prijuĝi, ĉar ĝi dependas de la samideanoj mem. Nu, ni tamen estas kontentaj, ĉar la alvenintaj laboroj entute estas bonaj, tiel ke la juĝantaro havis sufiĉe malfacilan taskon.

La premiitaj manuskriptoj, ordigitaj laŭ sia boneco, alvenis de:

S-ro juĝsekretario Emil Ziemann, Gnesen: „*Preskaŭ — —!*“;

S-ro A. Neitzel, Hannover: „*Helpo per Esperanto*“;

S-ro Ernst Frank, Hamburg: „*Mia franca amiko*“;

F-ino Hildegard Nickel, Potsdam: „*Esperanto*“.

Krome ni aljuĝis apartan premion al S-ro Ascan Lutteroth el Lauban, por lia artikolo „*Vojaĝaj memoroj*“. Kvankam ĉi tiu laboro ne plene respondas al la kondiĉoj de nia konkurso (ĝi ne priskribas „peresperantan“ travivaĵon sed „priesperantan“) ĝi tamen estas tiel interesa kaj lerte verkita, ke ĝi meritas premion. *Germana Esperantisto.*

La malnova libro.

De B. v. Burgdorff.

Estis certe formetejo aŭ io simila.

Nur malmulte da lumo venis tra malgranda fenestro, sed tiu havis diverskolorajn vitrojn, kaj la malnova violono, kiu staris en angulo, ĉar ĝi ne plu havis kordojn, kaj la malnova akvokaldrono, kiu iam ankaŭ povis kanti, interdisputis, tra kiu vitro la mondo plej bone aspektas. Sed pri tio ili konsentis: la fenestro de ilia ejo estis poeta naturo, ĝi sciis surmeti al la bildoj tie ekstere sian koloron.

Sed estis truo en la fenestro, kaj la malnova libro, kiu kuŝis sur la fenestra breto, certigis, ke ĉio aspektas tamen plej bone, vidata tra la truo, ĉar tiamaniere oni vidas la veron.

„Vi certe ne havas artan senton," diris la akvokaldrono kaj klakis per sia movebla tenilo sur sian dikan ventron. „Kiel vi nur povas partopreni la interparolon, vi ja nur estas fabellibro, en tia tute ne estas veraĵoj, sed nur elpensitaj mensogoj."

„Ĉu tiel?" diris la libro, „fabeloj tute ne estas elpensataj, ili simple ekzistas, ili dormas en sunlumo kaj lunbrilo, ili ĉirkaŭflugadas en la aero, kaj oni kaptas ilin kiel la knabo la papilion. Pro tio oni metis min antaŭ jaroj ĉi tien sur la fenestran breton. Kiam la suno brilas tra la truo, mi singardeme malfermas duone mian kovrilon; se tiam la radioj devojiĝas en ĝin, mi rapide fermas ĝin. La plej belaj orfadenoj ree forkuras, sed kelkajn mi tamen kaptas, tiuj restas ĉe mi, kaj ili estas la fabeloj; tiaj fabeloj ĉiam parolas veraĵojn, ĉar, tion vi ja devas scii, sunbrilo neniam mensogas."

„Se mi nur ankoraŭ povus plori," ĝemis la violono, „mi certe forlogus de vi la fabelojn el via kovrilo."

„Vi ne komprenas ion pri edukado de la junularo," rediris la libro, „fabeloj estas petolaj, ili volonte disflugetas en la tutan mondon, kaj tiam ili estas for por ĉiam, tial oni devas bindi ilin, por ke ili restu."

Nun oni aŭdis turniĝanta ŝlosilon en la kamerpordo; kaj ĉiuj silentis. Eniris maljuna viro kaj kondukis knabon je la mano. Ili traserĉis la ejon, kaj la malnova violono jam pensis: oni deziras havi min, kaj la akvokaldrono pensis, ke ĝi ree ricevos varmegan akvon; sed la serĉantoj preteriris ilin. Ĉe la fenestro la knabo restis staranta kaj diris: „Vidu onklo, jen malnova polvokovrita libro!" Kaj la maljuna viro respondis: „Ĝuste tion mi serĉas; tio estas fabellibro, se oni legas en ĝi, oni rejuniĝas."

Trad. el „Die Lese".

Das alte Buch.

Von B. v. Burgdorff.

Es war wohl eine Rumpelkammer oder so etwas ähnliches.

Nur wenig Licht schien durch ein kleines Fenster, aber das hatte bunte Scheiben, und die alte Geige, die in der Ecke stand, weil sie keine Saiten mehr hatte, und der alte Teekessel, der auch einst hatte singen können, stritten sich, durch welches Glas die Welt am besten aussehe. Aber darin waren sie einig, ihr Kammerfenster war eine poetische Natur, es verstand den Bildern da draussen seine Farbe anzuhauchen.

Doch ein Loch war im Fenster, und das alte Buch, das auf dem Fensterbrett lag, erklärte, durch das Loch sehe doch alles am schönsten aus, da bekäme man die Wahrheit zu sehen.

„Du hast wohl kein künstlerisches Empfinden," meinte der Teekessel und klappte mit seinem losen Griff auf seinen dicken Bauch. „Wie kannst du überhaupt mitreden, du bist ja nur ein Märchenbuch, darin stehen schon gar keine Wahrheiten, nur ausgedachte Lügen."

„So?" sagte das Buch, „Märchen werden überhaupt nicht erdacht, die sind einfach da, die schlafen im Sonnenlicht und im Mondschein, die fliegen in der Luft herum, und man fängt sie ein wie der Knabe den Schmetterling. Deshalb hat man mich vor Jahren hier auf das Fensterbrett gelegt. Wenn die Sonne durch das Loch scheint, mache ich vorsichtig meinen Deckel halb auf; wenn sich dann Strahlen hinein verlieren, klappe ich schnell zu. Die besten Goldfäden entfliehen wieder, aber einige fange ich doch ein, die bleiben bei mir, und das sind die Märchen; solche Märchen sprechen immer Wahrheiten, denn das könntet ihr doch wissen, Sonnenschein lügt nie."

„Wenn ich nur noch weinen könnte," seufzte die Geige, „ich wollte dir schon die Märchen aus deinem Deckel herauslocken."

„Ihr versteht nichts von Jugenderziehung," erwiderte das Buch, „Märchen sind wilde Dinger, die flattern gern in alle Welt hinaus, und dann sind sie fort für immer, darum muss man sie einbinden, damit sie bleiben."

Jetzt hörte man an der Kammertür einen Schlüssel umdrehen; da schwiegen alle. Ein alter Mann kam herein und führte einen Knaben an der Hand. Sie suchten herum, und die Geige dachte schon: man will mich haben, und der Teekessel dachte, er bekäme wieder heisses Wasser; aber die Suchenden gingen an ihnen vorbei. Am Fenster blieb der Knabe stehen und sagte: „Sieh 'mal, Onkel, ein altes, verstaubtes Buch!" Der alte Mann aber antwortete: „Gerade das suche ich; das ist ein Märchenbuch, wenn man darin liest, wird man wieder jung."

Aus „Die Lese".

Kion infanoj diras kaj demandas.

La patro ĉaspafis leporon, kaj Joĉjo kaj Margenjo mire rigardas ĝin en la kuirejo. Margenjo stritusas la molan felon kaj tre ĝojas pri la besto. Kiam la infanoj estas forlasintaj la kuirejon, la kuiristino komencas prepari la leporon; ŝi senfeligas ĝin kaj elprenas la intestojn. Tiam Margenjo revenas en la kuirejon. Pala pro teruro, ŝi vidas kuŝanta la sangan leporon, kaj ĝemante ŝi petegas la kuiristinon: „Revestu ĝin, revestu ĝin!"

*

Heinz diras, ke li volas fariĝi pastro. „Ĉu vi scias, panjo, mi deziras fariĝi kampara pastro." „Sed kial do en kamparo?" „Ho, tie mi ĉiam povas flari la sterkon, ĝi odoras treege bone!"

*

Fritz kaj Rudi vizitas muzeon kun sia edukistino, kiun ili tre amas, kaj rigardas la pajloŝtopitajn bestojn. Kiam ili hejmeniras, ili diras: „Fraŭlino, kiam vi mortos, ni ankaŭ vin igos pajloŝtopi, tiam ni ĉiam havos vin ĉe ni."

*

Fritz petas sian patrinon pri tusbombono. Vi ja ne havas tuson, diras al li la patrino. „Sed ĝi venos baldaŭ," diras la malgrandulo.

*

Hans instruas sian malgrandan fraton: Eĉ se oni distranĉus Dion en tre malgrandajn pecojn, li tamen ankoraŭ restus viva.

*

Hans veturigas hejmen en sia malgranda puŝveturilo rozojn, kiujn li volas planti en sian ĝardenon. Sed li estas ĉe tio tiel fervorega, ke li tute ne aŭdas la admonojn de sia patrino, veturi malrapide. — Kaj efektive — jen li falas — jen kuŝas la puŝveturilo kun la rozoj. La patrino diras al li: „Vidu do, tio estas la sekvo, se oni ne obeas." Sed Hanĉjo leviĝas kaj diras: „Ho, estas vere malsaĝaĵo de Dio, ke li ne igas min esti obeema."

*

Kiam Helmut estis du- ĝis tri-jara, li ŝatis trinki sian lakton tre dolĉa, kaj antaŭ ĉio li volonte mem ĵetis la sukeron en la lakton. Foje oni tion malpermesas al li. Tiam li ludas „fervojo" per la sukerujo, ŝovas ĝin tien kaj reen kaj fajfas ĉe tio. Fine li haltigas ĝin, krias laŭte: „eliri", prenas kelkajn pecojn da sukero kaj pum — ili estas „elirintaj" en lian tason.

*

Gerd kaj Ruth ludas „hundoj", kaj Ruth nepre volas esti „knabina hundo". „Knabinaj hundoj ne ekzistas," diras Gerd. „Kion vi diras, knabinaj hundoj ne ekzistas? Vi certe neniam vidis pudelon kun longaj bukloj kaj harbantetoj!"

Tradukis Fridolin.

Was Kinder sagen und fragen.

Der Vater hat einen Hasen geschossen, und Hans und Grete sehen denselben bewundernd in der Küche an. Grete streichelt das weiche Fell und freut sich sehr über das Tier. Als die Kinder aus der Küche gegangen, macht sich die Köchin daran, den Hasen vorzurichten; zieht ihm das Fell ab und nimmt ihn aus. Da kommt Gretel wieder in die Küche zurück. Schreckensbleich sieht sie den blutigen Hasen daliegen, und jammernd fleht sie die Köchin an: „Wieder anziehen, wieder anziehen!"

*

Heinz erklärt, Pfarrer werden zu wollen. „Weisst du, Muttel, ich möchte Pfarrer auf dem Lande werden." „Aber, warum denn auf dem Lande?" „Ach, da kann ich immer den Dung riechen, der riecht so furchtbar gut!"

*

Fritz und Rudi besuchen mit ihrem Fräulein, das sie sehr lieben, ein Museum und sehen sich die ausgestopften Tiere an. Als sie heimgehen, erklären sie: „Fräulein, wenn du stirbst, lassen wir dich auch ausstopfen, dann haben wir dich doch immer bei uns."

*

Fritz bittet seine Mutter um ein Hustenbonbon. Du hast ja aber keinen Husten, sagt ihm die Mama. „Er tommt aber bald," meinte der kleine Mann.

*

Hans belehrt seinen kleinen Bruder: Wenn man den lieben Gott auch in ganz kleine Stücke schneidet, so bleibt er doch noch immer lebendig.

*

Hans fährt in seinem kleinen Schiebkarren Rosen nach Haus, die er in seinen Garten pflanzen will. Aber er ist dabei so übereifrig, dass er die Ermahnungen seiner Mutter, doch langsam zu fahren, ganz überhört. — Und richtig — da liegt er — da liegt der Karren mitsamt den Rosen. Die Mutter sagt ihm: „Siehst du wohl, das kommt davon, wenn man nicht gehorcht." Aber Hänschen erhebt sich und sagt: „Ach, es ist doch wirklich dumm vom lieben Gott, dass er mich nicht artig sein lässt."

*

Als Helmut zwei bis drei Jahre alt war, liebte er es, seine Milch recht süss zu trinken, und vor allem warf er gern selbst den Zucker in die Milch. Das wird ihm einmal verboten. Darauf spielt er mit der Zuckerdose Eisenbahn, schiebt sie hin und her und pfeift dabei. Endlich hält er sie an, ruft laut: „Aussteigen", nimmt ein paar Stücke Zucker und wupp — sind sie in seine Tasse hinein „ausgestiegen".

*

Gerd und Ruth spielen „Hunde", und Ruth will durchaus ein „Mädelhund" sein. „Mädelhunde gibt es nicht," sagt Gerd. „Was sagst du, Mädelhunde gibt es nicht? Du hast wohl noch nie einen Pudel mit langen Locken und Haarschleifchen gesehen!"

Entnommen aus „Was Kinder sagen und fragen". Gesammelt von einer Grossmama. Verlag R. Piper & Co., München.

Korespondo.*)

Letero okaze de mondonaco al nevo.

. . . . ., la 8an de Junio 1912.

Mia kara, bona nevo!

Mi vidis la bonajn lernejatestojn, kiujn vi sendis antaŭ kelkaj tagoj al viaj karaj gepatroj, kaj mi kore ĝojis pri ili. Tial mi plenumas agrablan por mi devon, havigante al vi rekompencon por via diligento kaj via modela konduto, kiun via instruisto jam laŭdis al ni okaze de sia lasta vizito en Z. Mi estas tute konvinkita, ke la plej bona rekompenco por vi konsistas en la sukcesoj, kiujn vi ankoraŭ atingos per viaj scioj kaj via bonega karaktero, sed mi ankaŭ kredas, ke la kunsenditaj 250 Markoj jam nun al mia kara nevo ŝajnos esti ĝojiga frukto de lia diligento kaj lia neriproĉebla konduto. Ĉe prudenta uzo vi povas fari multon per tiu ĉi sumo. Laŭ mia opinio vi povus uzi 50 Markojn por tramigri dum la libertempo la tiean belan regionon. Ĉar ne ĉiam estas facile por viaj gepatroj, pagi por vi la multajn elspezojn, mia plua deziro estus, ke vi rezervu al vi 150 Markojn por libroj kaj vestoj, kiujn vi bezonos en la venonta lerneja jaro; restus al vi tamen ankoraŭ 50 Markoj, pri kiuj vi povus disponi laŭ plaĉo. Se viaj studoj ankaŭ plue estos akompanataj de tiel bonaj sukcesoj, mi volonte ankaŭ plue estos helpema al vi. Laŭ tiu rilato la hodiaŭa donaco estu instigilo por plua sekvado de la ekirita vojo, sed aliflanke ĝi ankaŭ estu por vi pruvo de mia kora simpatio al vi, kiel mi ĉiam estos

via
vin tre kore amanta onklo
N.

Brief bei einem Geldgeschenk an einen Neffen.

. . . . ., den 8. Juni 1912.

Mein lieber, guter Neffe!

Die schönen Schulzeugnisse, die Du vor einigen Tagen Deinen lieben Eltern schicktest, habe ich gesehen und mich herzlich darüber gefreut. Ich mache es mir daher zur angenehmen Pflicht, Dir für Deinen Fleiss und Dein musterhaftes Betragen, welches Dein Lehrer bei seinem letzten Besuch in Z. uns schon rühmte, eine Belohnung zukommen zu lassen. Ich bin wohl überzeugt, dass die beste Belohnung für Dich in den Erfolgen liegt, welche Du bei Deinen Kenntnissen und Deinem vortrefflichen Charakter noch erringen wirst; aber ich glaube auch, dass die beifolgenden 250 Mark für meinen lieben Neffen jetzt schon als eine erfreuliche Frucht seines Fleisses und seines tadellosen Verhaltens erscheinen werden. Du kannst bei weiser Bemessung mit diesem Betrage schon etwas Ordentliches beginnen. Nach meiner Meinung könntest Du etwa 50 Mark dazu verwenden, während der Ferien die dortige schöne Gegend zu durchwandern. Da es Deinen Eltern nicht immer leicht ist, die vielen Ausgaben für Dich zu bestreiten, so ginge mein weiterer Wunsch dahin, 150 Mark für Bücher und Kleider fürs nächste Schuljahr Dir davon zurückzulegen; es blieben Dir dann immerhin noch 50 Mark, über die Du nach Belieben verfügen könntest. Sind Deine Studien auch ferner von so guten Erfolgen begleitet, so will ich gern auch weiter Dir hilfreich zur Seite stehen. Möchte in dieser Hinsicht das heutige Geschenk eine Triebfeder zum ferneren rüstigen Fortschreiten auf der betretenen Bahn sein, möge es Dir aber auch andererseits einen Beweis meiner herzlichen Zuneigung zu Dir geben, wie ich stets sein werde

Dein
Dich innig liebender Onkel
N.

La ostoj.

Orienta rakonteto.

Avarulo kolere disputis kun sia najbaro, kiam preterpasanto lin demandis:

„Kial vi disputas kun li?“

Li rediris:

„Mi manĝis rostitan bovidan kapon kaj ĵetis la ostojn antaŭ mian pordon, por ke miaj amikoj ĝoju pri ili kaj miaj malamikoj koleru, vidante, kiel mi vivas en bona stato. Kaj tiu ĉi fripono venis neatentite kaj forŝtelis la ostojn kaj ĵetis ilin antaŭ sian propran pordon.“

Die Knochen.

Orientalisch.

Ein Geizhals zankte heftig mit seinem Nachbarn, als ein Vorübergehender ihn fragte:

„Weshalb streitest du mit ihm?“

„Er entgegnete:

„Ich hatte einen gebratenen Kalbskopf gegessen und die Knochen vor meine Tür geworfen, damit meine Freunde sich daran erfreuten und meine Feinde ihren Aerger hätten, wenn sie sähen, wie gut ich mir's gehen lasse. Und dieser Schurke da stand heimlich auf und stahl die Knochen und warf sie vor seine eigene Tür.“

*) Aus: M. Uebelacker, Deutscher Privat-Briefsteller, Friedrich Euler Verlag, Berlin W.

El la vivo kaj sciencoj.

Bona konsilo.

Estu tro hontema por hontigi aliajn.

Ĉiu homo havas siajn malgrandajn malfortojn kaj mankojn. Ekzistas certaj homoj, kiuj trovas kontentiĝon en tio, hontigi siajn proksimulojn en ĉeesto de aliaj personoj. Tio estas tre facila, sed ĝi ankaŭ estas kruda kaj eventuale eĉ senhonta, ne nur, kiam agiĝas pri familianoj. Se ni mem estas la suferanta parto, ni sentas tion tre klare kaj ne nur hontas, sed ankaŭ malestimas la hontiganton. Ni vere devus klopodi delikatigi nian hontemon kaj lerni ne atenti sendanĝerajn mankojn de niaj proksimuloj.

August Belger, Stralsund.
Laŭ „Allgemeiner Wegweiser".

Kiamaniere oni povas mezuri la rapidecon de vagonaro.

Sur preskaŭ ĉiuj eŭropaj fervojaj linioj estas uzataj reloj, kiuj havas longecon de dek du aŭ dek kvin metroj. Per rigardo el la kupea fenestro aŭ per demando al la konduktoro oni facile povas ekscii, ĉu reloj de dek du aŭ dek kvin metroj estas uzataj sur la linio. Por mezuri la pohoran rapidecon en kilometroj de vagonaro, en kiu oni sidas, oni kalkulas dum la veturo, observante la sekundan montrilon de sia poŝhorloĝo, la nombron de la puŝoj, kiujn la vagonaro faras dum unu minuto. Kiel oni scias, tiuj ĉi puŝoj estas evidente rimarkeblaj eĉ en vagonoj kun la plej bonaj risortoj. La ricevitan nombron de la puŝoj oni multiplikas per ses, kaj ĉi tiun rezultaton denove per dek du aŭ per dek kvin, laŭ la longeco de la reloj, kaj de la finrezultato oni forstrekas la du lastajn ciferojn. Ekzemple: Vagonaro veturas sur dek-du-metraj reloj kaj oni kalkulas cent puŝojn dum unu minuto. Do, centoble ses faras sescent, kaj sescentoble dek du faras sep mil ducent; forstrekante la du lastajn ciferojn, oni ekscias, ke la vagonaro veturas per rapideco de 72 kilometroj po horo.

La ŝipoj por grandaj rapidoj.*)

La plej grandaj rapidoj sur akvo estas efektivigitaj de iuj malgrandaj ŝipoj, posedantaj specialajn karakterojn, nomitaj *hidroplanoj*. Tiuj ŝipoj, anstataŭ fendi la ondojn, glitas sur la supraĵo de l'akvo, tuj kiam ilia rapideco estas sufiĉa. Tiamaniere, la fortoj estas malpliigitaj ĝis minimumo, kaj oni povas, kun difinita maŝina forto, atingi rapidojn, kiuj ne estus eblaj per la ordinara tipo de ŝipoj.

Bedaŭrinde, tiun principon de la hidroplanoj oni ne povis apliki al grandaj ŝipoj, sed nur al boatoj.

Jam antaŭ 40 jaroj, inventinto, Ramus, imagis glitantan boaton, kiun li montris al la angla maristaro, kaj samtempe Sir John Thornycroft, fondinto de la anglaj konstruejoj por la maraj ŝipoj, faris eksperimentojn pri tiu nova tipo de boato. Sed la provoj ne sukcesis, pro la tro granda pezo de la tiamaj motoroj.

La eksplodmotoroj, kiujn tiel perfektigis la aŭtomobila fabrikado, ebligis la efektivigon de la hidroplanoj.

Per tiuj boatoj oni rapide efektivigis grandajn rapidojn. Sed, multaj studadoj pri la formo de la ŝipkorpo restis farotaj, ĉar tiuj unuaj hidroplanoj ne estis tre stabilaj, kaj ĝis nun ili ne povis glitflosi sur la maro, pro tiu malbona stabileco.

Sir John Thornycroft, daŭrigante siajn antaŭajn studadojn, sukcesis antaŭ nelonge konstrui hidroplanon, kiun oni sukcese provis sur la maro.

Tiu hidroplano, kiun ĝia konstruinto nomis *Miranda IV*, estas longa 8,50 metrojn, larĝa 2,10, kaj posedas motoron de 100 mekanikĉevaloj.

Ĝia ekstera aspekto estas tiu de ordinara aŭtomobila boato, kaj, kiel ĝi, ĝi flosas dum malgrandaj rapidoj. Sed, kiam la rapido superas iun limon, la boato supreniras sur la akvo, kaj de post tiu momento ĝi glitas sur la akva supraĵo, per saltoj, kiuj tamen ne malhelpas ĝian stabilecon.

Dum la lastaj provoj tiu hidroplano, enhavanta kelkajn personojn, superis la rapidon de 35 mejloj (64,82 km) hore.

*) Tiun ĉi artikolon ni prenis el la nove aperinta „*Scienca Gazeto*", kiu staras sub la lerta redaktado de S-ro Ch. Verax. Ni tre rekomendas al niaj legantoj la abonon de tiu gazeto, kiu enhavas komuninteresajn kaj ankaŭ por laikoj facile kompreneblajn artikolojn pri scienco kaj industrio. La jara abonprezo estas 3 Sm. Oni povas aboni senpere ĉe la administracio Hachette & Cie., Paris, Boulevard St. Germain 79, aŭ ĉe Esperanto Verlag Möller & Borel, Berlin SW. 68, Lindenstr. 18/19.

La klubo de la „gajaj maljunaj sinjorinoj".

En Los Angeles (Kalifornio) stariĝis nova klubo, kiun fondis la „plej junaj" sinjorinoj de la urbo; la plej junaj sinjorinoj, tute ne laŭ jaroj, sed laŭ juneco de l'koro, laŭ gajeco kaj sereneco de l'animo. Jam la statutoj diferencas de la seriozaj paragrafoj de kutimaj unuiĝregularoj, ĉar en ili estas dirite: „Gajeco kondukas al eterna juneco, la vivo estas eterna, ne ekzistas tielnomata morto. Feliĉo kaj bona digesto devas helpi unu la alian. Estas malpermesite, cerbumi pri malsano, malfeliĉo aŭ zorgoj". La klubo akceptas nur optimistajn vivoĝojajn sinjorinojn, kiuj fidas al Dio, al si mem kaj al la mondo, kaj kiuj — jam finis sian sesdekan jaron. Nur se ili pruvis,

ke ili ankaŭ en malfacilaj situacioj de l'vivo ne perdas la animan egalpezon kaj konservas sian gajecon, nur tiam ili estas akceptataj en la „*Jolly old Ladies-Club*", la klubo de la „gajaj maljunaj sinjorinoj" de Los Angeles.

Respondo.

(La unua nombro montras la numeron de la koncerna demando kaj la dua la paĝon de G. E., sur kiu la demando troviĝas.)

9 (78). Mi faris bonajn spertojn kun la sistemo de Müller, kiun mi tre rekomendas al vi. Antaŭe malforteca kaj malsanema, mi nun estas sufiĉe forta kaj vivoĝoja. Legu la broŝuron „Mein System" de Müller, aperintan en la eldonejo de Tillge, Kopenhagen, Citygade 19. — Kiel bonajn gimnastikajn gazetojn mi rekomendas al vi „*Körper und Geist*" (R. Teubner, Leipzig, Poststr. 3) kaj „*Deutsche Turnzeitung*" (Paul Eberhardt, Leipzig, Königsstr. 19). *Fridolin.*

Pedagogia fako

6. Pri „sia".

Demando: Ĉu la frazoj: *Li nomis ŝin* ***sia*** *infano*, kaj: *Li estas* ***sia*** *propra kanceliero*, estas ĝustaj? *Vejno.*

Respondo: Certe ambaŭ estas ĝustaj. Eĉ laŭ la plej stereotipa regulo: „Oni metas *sia*, se ĝi rilatas al la subjekto de l'frazo", ĝustigas kaj necesigas ĉi tie la uzon de „si". — Sed ĉar oni ofte trouzas tiun simplan regulon, mi volas iom detale klarigi la aferon.

Por decidi, ĉu oni uzu „sia" aŭ „lia, ŝia, ĝia", se ne tuj ĝin decidas la lingvosento, oni observu jenan regulon, kiu estas rigide plenumebla. — Unue oni kompletigu la frazon, se en ĝi estas ia mallongigo. Infinitivo, substantivo kun verba signifo, participo, do ĝenerale ĉiu formo de verbo prezentas apartan frazon, kiu estas submetita al la ĉeffrazo; duobla subjekto montras kuntiron de du apudordigitaj frazoj. — Laŭ tio „la patro kaj lia filo iras" estas fakte du frazoj; „Mi vidis ĉevalon manĝantan sian avenon" estas ĉeffrazo kun enhavata subfrazo; „La amo al sia patrino estas natura virto" enhavas same subfrazon: „ke oni amas sian patrinon". — Do oni ĉiam konsideru, ke ĉiu frazo, ĉu kompleta, ĉu mallongigita, estas frazo: se aperas iu formo de la verbo, havanta post si substantivon, ĉu en akuzativo, kiel post la participa, ĉu ligitan per „de" aŭ alia prepozicio, kiel okazas post la substantiva formo, tio ĉiam signifas frazon; tiam oni bezonas nur kompletigi, kaj en la kompleta frazo „si" rilatos ĉiam al la subjekto de sia frazo. — En viaj ekzemploj dua verbo ne enestas, do la frazo estas simpla, kaj la „regulo" senpere estas aplikota; sed se mi dirus: „Li kredis ŝin esti sia infano", mi farus eraron, ĉar „Li kredis, ke ŝi estas lia", kaj ne „sia infano". — Ĉe la dua okazo oni eĉ ne povas ekpensi pri io alia ol „sia"; eĉ la komencanto sentos, ke „Li estas lia propra kanceliero" estas absurda en la celita senco; ĝenerale la okazoj, kie oni povas uzi „propra" post „lia, ŝia, ĝia", estas maloftaj en la praktiko. — Farante tiel la kompletigon de la frazoj, vi rapide sentos, kial oni diras: „La patro kaj lia filo ĉasas" (= la patro ĉasas, kaj lia filo ĉasas), kaj en la alia okazo: „La patro kun sia filo ĉasas".

Mallongaj respondoj.

Al S-ro E. M. Laŭ klareca vidpunkto vi estas prava: oni pli bone metus post la verboj, signifantaj havon kaj esprimon de penso, la konjunkcion „ke"; sed aliflanke du konjunkcioj unu apud la alia ĝenas; laŭ tiu konsidero ni povas ellasi en tiaj okazoj la konjunkcion ke, se la senco restas ankaŭ sen ĝi sufiĉe klara. Ekzemple en tiu ĉi frazo: „Mi opinias, vi estas prava" — la konstruo ankaŭ ne estas kompleta, tamen permesebla, ĉar oni ĝin povas konsideri cito: Mi opinias: „Vi estas prava." — En la diskutata okazo la forlaso de „ke" estas efektive plibeligo de la stilo, sen nekomprenebligo de la senco. Sed ĝenerale mi konsilas al vi, en similaj okazoj eviti tian ellason de konjunkcio per tio, ke vi ŝanĝas la frazordon, ekz. en la citita frazo jene: Se estus inter ili pafistoj, opiniis aliaj, estus plej bone, se . . . Do esence vi estas prava, kaj la forlaso de „ke" estas stillibereco, kiun tamen ofte uzas verkistoj ĝuantaj ĝeneralan ŝaton.

Bibliografio

Ĉiuj libroj markitaj per steleto estas riceveblaj per:
(alle mit Sternchen versehenen Bücher sind erhältlich durch:)
Esperanto Verlag Möller & Borel, Berlin SW. 68, Lindenstrasse 18/19.

Tie ĉi ni nur recenzas verkojn, duoble ricevitajn.

***„Nord - germanaj Rakontoj"** de Heinrich Bandlow. Tradukis Ella Scheerpeltz. (Esperanta Biblioteko Internacia No. 22). — Esperanto Verlag Möller & Borel, Berlin. 0,100 Sm.

Jen kvin gajaj rakontetoj, kiuj estas tradukitaj en bonstilan Esperanton. Mi povis kolekti nur malmultajn citindaĵojn, ekz. „estis nenecesa, ke . . .", „ie alie ankaŭ estis bela.", „kion? **vokis** la servistino" ktp.

La rakontetoj estas tre flue legeblaj pro la korekta stilo; kaj mi ilin tre rekomendas al grupoj por komuna legado. Ankaŭ mi per ili dum unu horo forigis la neeviteblan enuon en fervojo. Kaj oni eĉ ne scias, kiun el la ridetigaj spiritoj oni preferu, ĉu la ruzan domposedanton aŭ ĉu la pliruzan pastron, kiu helpas senplumiĝi la anseron aŭ ĉu la trompitan farmaciiston. — Tiu, kiu deziras amuziĝi dum horeto, ĉi tiun libreton aĉetu. *Ch. Pulvers-Basel (I. U. E. V.).*

*

***Pourquoi les postiers doivent apprendre l'Esperanto.** De Gabriel Chavet. — Esperantista Centra Oficejo, Paris. 0,125 Sm.

Per trafaj argumentoj la aŭtoro pruvas la utilon de Esperanto por la poŝto, telegrafo kaj telefono. Liaj vortoj estas des pli gravaj, ke li — kiel franco — ne havas kaŭzon plendi pri la uzo de sia gepatra lingvo por la dokumentoj, formularoj ktp. de la internaciaj servoj de la poŝto. Konsiderante la gravecon de vere internacia lingvo por la vastampleksa inter-

nacieco de la poŝtaj servoj, oni devas miri, ke nur nun la movado ankaŭ inter poŝtistoj vigliĝas. — La aŭtoro interalie proponas, redakti la ĵurnalojn oficialajn de la Universala Unio en franca lingvo kaj en Esperanto. Nuntempe ili estas redaktataj en franca, germana kaj angla lingvoj. Oni konstatos, ke ĉi tiu propono respektas la nunajn cirkonstancojn, konservante la francan lingvon, kaj ke ĝi taŭgas prepari la nuran uzon de internacia lingvo, forigante la uzon de du aliaj naciaj lingvoj. Pro la ĝenerala, kultura evoluiĝo certe samrajte ankaŭ aliaj naciaj lingvoj povus postuli, esti aplikataj. Tia nacia varieco ne estas ekonomia kaj kontraŭdiras la internacian ideon, kiu pli kaj pli penetras en ĉiujn interhomajn rilatojn. — La broŝuro de Chavet estas tre bona propagandilo por poŝtistoj, kiu meritas esti tradukata en Esperanton, por ke kiu-ajn-nacia propagandisto povu uzi ĝin. *Arnold Behrendt.*

*

*__L'Échec de la Délégation pour l'adoption d'une Langue auxiliaire internationale.__ Recueil de Documents. — Esperantista Centra Oficejo, Paris. 1911. Prezo ne montrita.

La Centra Oficejo, kiu multe pli okupiĝas pri la „famoza" Delegacio, ol tiu ĝin meritas, eldonis du luksajn kajerojn, kiuj enhavas represon de multaj dokumentoj, pruvantaj la strangajn kaj ne ĉiam tute honestajn artifikojn de tiu bela „institucuro", kaj opiniojn de kelkaj delegitoj. Analizo de la diversaj artikoloj en la du kajeroj estas superflua, ĉar ili preskaŭ ĉiuj estas jam konataj de la legantoj. — Ni devas tamen danki la Centran Oficejon, kiu eldonis tiujn bonajn armilojn kontraŭ niaj „samideanoj", kaj ni povas nur bedaŭri, ke ĝi ne okazis en Esperanto; en sia franca vesto tiuj artikoloj ne povos penetri malproksimen inter la esperantistaro. *Lr. (I. U. E. V.)*

*

*__La Senlaca Sinofero.__ Novelo originale verkita de Roksano. — Aĉetebla de la aŭtorino, Villa Roksano, Beziers (Hérault) Francujo. 0,250 Sm.

La vicĉefvagabondino iomete migras sur amvojetoj, plenaj de ŝtonoj kaj pikiloj; lerta kondukanto ŝi estas, kaj sufiĉe malindulga al la leganto. Ŝi rakontas pri amĝojo en senpacienca atendado, sed ŝi ne kaŝas de ni la larmojn, ploritajn pro mortinta amo; ŝi senkompate igas nin kunsenti kordoloron pro la kulpiĝinta vivo de ĉiam amata persono. — La lingvo estas simpla; ĝuste tia simpleco harmonias kun la ĉiama, senfanfarona sinofero de virino amanta. — La esperantigon de nomoj mi ne ŝatas (Hedvigo, Roberto); ne logika mi opinias la frazon: „mi havis sekreton kun vi", se oni deziras esprimi, ke mi kaŝis ion de vi; tiuokaze oni diru „kontraŭ vi"; ĉar estas tre eble, ke mi havas sekreton kun vi kontraŭ alia persono, t. e. ke mi kaj ankaŭ . kaŝas saman aferon de alia persono. *Arnold Behrendt.*

*

*__Historieto de Esperanto.__ De Dro Andreo Fiŝer. (Premiita ĉe la literatura konkurso de la 7a Universala Kongreso de Esperanto en Antwerpen 1911.) — Presejo „Esperanto", Tiflis. 0,250 Sm.

Estas tre aprobinda iniciato de la Sepa, ke ĝi instigis la aŭtorojn al verkado de „Historio de Esperanto"; dankon ni ŝuldas al ĉiu, kiu helpas meti ŝtonon al tiu konstruaĵo. — S-ro Fiŝer el Tiflis faris tre utilan laboron, priskribante, laŭ kronologia ordo, la okazintaĵojn de post la naskiĝo de Esperanto. Havante nun tiun bazon, oni povas plikompletigi ĝin, ĉiu scianto aldonante tion, kion li pli detale aŭ pli ĝuste scias. — Mi mem bedaŭrinde ne sufiĉe konas tiun unuan tempon de nia lingvo, por povi prijuĝi tiun „Historieton", tamen kelkaj detaloj ŝajnas al mi ne tute ekzaktaj, ne parolante pri la preseraroj, kelkfoje tre ĝenantaj. — Ekzemple la unua lingvo de Dro Zamenhof estis nomata „lingwe uniwersala", kaj ne „lingwo"; la broŝuro de Einstein havas la titolon „Weltsprachliche Zeit- und Streitfragen", ne „Weltsprache. Zeit- und Streitfragen"; la unua literaturaĵo estis „Neĝa blovado", ne „La gefratoj"; la nomo de l' meritoplena pioniro estas Kuŝnir, ne Kuŝner ktp. ktp.

Sed ni esperu, ke baldaŭ aperos nova, kompletigita eldono, kie per la kunlaborado de aŭtentikaj tiamuloj ĉiu eraro estos evitita, kaj la tuta esperantistaro povos sciiĝi pri tiu bela tempo, kies kono nun estas la privilegio de nur malmultaj personoj. *Lr. (I. U. E. V.)*

*

*__Maja Nokto aŭ La Dronintino.__ Rakonto de N. V. Gogol. El la rusa lingvo tradukis Romano Frenkel (Kolekto de „Danubo"). — Editura „Esperanto" Bucureŝti. 0,250 Sm.

Romano Frenkel ĝojigis nin per traduko de tiu ĉi verketo de la fama rusa verkisto. La rakonto estas skribita en simila maniero, kiel la rakontoj de la ŝatata angla verkisto Dickens. Legante iun fremdnacian verkon, mi ofte havas senton, kvazaŭ kaŝanta kurteno leviĝus de misteroplena estaĵo. Iomete strange, sed tre interese ĝi prezentas sin al ni. Aliajn ol la propranaciajn belaĵojn, kutimojn kaj vivmanierojn oni ekscias. Kaj tiun ĝuon ni dankas precipe al la pero de Esperanto. Pli bone laŭ mia opinio ja estus, se la recenzanto estus esperantisto el la sama nacio kiel la verkisto de la traduko, ĉar tiu konas la originalan verkon. Mi nur povas diri, ke la Esperanta stilo tre plaĉas al mi, kaj pro tio mi ja rajte povas diri, ke la traduko estas bona. Estu nur permesate al mi atentigi pri kelkaj esprimoj. Paĝo 18a, linio 23a mi preferus anstataŭ „elurĝi" per igis lin diri; paĝo 29a, linio 2a kaj 10a de malsupre mi dirus *peze* kaj *peza* anstataŭ *malfacile* kaj *malfacila*. Cetere mi tre rekomendas la kajeron al la esperantistoj. *Martha Lehner (I. U. E. V.)*

*

El la domo tie kontraŭa. Skizo laŭ la vivo. Verkis Arnold Behrendt. — Ricevebla de l' aŭtoro, Breslau 16, Maxstr. 22 (Germanujo). 0,20 M. (0,100 Sm aŭ 1 respondkupono).

Al la memoro de sia frato la aŭtoro dediĉis tiun ĉi belegan kortuŝan rakonteton pri malfeliĉa 18-jara ftizulo, kiu antaŭsentas sian baldaŭan foriĝon, for de tiu ĉi bela mondo, kiun li amas, for de la birdoj, kiujn li ĉiumatene nutras. La skizo ankaŭ rakontas pri la malfeliĉa patrino, kiu malgraŭ la propra animdoloro ĉiam denove per karesaj kaj kuraĝigaj vortoj konsolas lin kaj vekas novajn esperojn al saniga estonteco. Kaj ĉiam ŝi sukcesas. Ĉar — „Patrino ne povas mensogi!" — Ho! Ĉu li ne scias, kiom da mensogetoj povas fari patrino por kaŝi al amegata malfeliĉa infano la veron? — Certe rekomendinda verketo ne nur pro la enhavo, kiu ja kondukas nin en ombraĵojn de la vivo, sed ankaŭ pro la ĉie konata bonega stilo de nia fervora samideano. *Dr. Br.*

*

Br. Kuhl: Zwiezty podrecznik do nanki jezyka miedzynarodowego Esperanto. (Konciza lernolibro de la lingvo internacia Esperanto, por poloj.) — Societo „Esperanto" en Krakovo. 0,300 Sm.

La pola esperantistaro akceptis kun ĝojo ĉi tiun lernolibron. La aŭtoro, kiu havas sperton en instruado de Esperanto, faris ĝin konciza kaj tamen plene sufiĉanta por ellerno de la lingvo. Ĝi estas por ĉiuj esperantemaj poloj tre rekomendinda. — Ĉe la adiciado kaj subtrahado uzas la aŭtoro la terminojn *plus* kaj *minus*. Ili estas vere internaciaj terminoj, kaj ne kontraŭstaras la fundamenton, tial mi konsideras ilin uzindaj. Tamen ne uzinda mi juĝas la vorton *villo* anstataŭ *vilao*. Ĝi nur konfuzas la lernanton kaj kontraŭdiras la senesceptecon de nia lingvo. — Ĉe la fino de l' lernolibro, inter aliaj rakontetoj estas iom malfeliĉe metita tiu de Era, „La verdstelulo". Pro tio malfeliĉe, ĉar lerninto de Esperanto legante ĝin, havas la impreson, ke nia afero estas efektive ankoraŭ ia iluzio. Ni devas montri la faktojn.

ho-mo.

Por lertuloj

Enigmoj kaj problemoj.

No. 16. Litera enigmo.

	a	a	a	a	a	b	b	monato
	d	e	e	e	e	e	e	manĝaĵo
	e	f	f	f	g	h	h	noktbesteto
i	i	k	k	l	l	l	l	l
	m	m	n	n	n	n	o	muzikaĵo
	o	o	o	o	o	o	o	arbo
	p	r	r	r	r	r	r	arbo
	r	r	s	s	t	t	t	muzikverko
	t	u	u	v	v	v	z	fluidaĵo

La kvara horizontala linio nomas faman instruitulon kaj la mezvertikala lian nemorteman verkon.

Nolte.

No. 17.

Kun **s** ĝi vivas en rivero kaj la maro,
Kun **ŝ** ĝi sonas dolĉe en herbejo kaj arbaro,
Kun **p** ĝi estas fiera suda planto.
Ĉu vi jam scias la tri vortojn, ho leganto?

S-ro H.

No. 18.

La unua prenas la duan,
Forrajdas — li ne ŝatas iri.
L' edzino prenas la tutan
El ĝarden'; ŝi volas kuiri. *Kobo.*

Solvoj el la antaŭa kajero.

No. 13.

Tero en edziĝa vesto
Jam atendas vin;
Kaj la homo, floro, besto
Antaŭsentas vin;
Ja la birdo en la nesto
Eĉ alvokas vin:

Venu!

Ĝoje ni akceptas vin,
Ĉarma pentekosta festo.

No. 14.

Okcidento.

No. 15.

Delegito.

Ĝustajn solvojn sendis:

a) de ĉiuj numeroj: Instruisto P. Adler, Berlin, Britz; referendario Arntz, Godesberg; Walter Bergmann, Rostock; F-ino Katharina Beck, Neukölln; Prof. Carlo Bourlet, Paris; Willy Bratfisch, Dresden; B. Breslau, Reĵica (Rusujo); F-ino Lina Brockmann, Hamburg-Gr.-Borstel; instruisto J. Buchschatz, Burg b. Magdeburg; F-ino Wally Cuno, Königsberg (Prusujo); gimnaziano Karl Decker, Gommersheim; instruisto E. Dombrowski, Neukölln; F-ino Maria Dreesbach, Godesberg; F-ino Henny Drückhammer, Lübeck; S-ino Marie v. Ganahl, Kufstein (Tirolujo); Carl Handrich, Hellerau-Dresden; A. Ivanickij, St. Petersburg (Rusujo); Arthur Kirchhübel, Neusalza-Spremberg (Saksujo); Em. Krafczyk, Breslau; Paul Krüger, Dresden; F-ino Margarete Lachmund, Leisnig (Saksujo); A. Maschke, Dresden; E. Momber, Oberdollendorf; F-ino Hildegard Nickel, Potsdam; Albert Schmieder, Dresden; Chr. Sewing, Duisburg; Otto Strutz, Stettin; Hanns Viereck, Freienwalde a. O.; instruisto Chr. Wiedenmann, Bopfingen; M. Wiesner, Düsseldorf; instruisto W. Wittbrodt Neukölln; juĝsekretario Ziemann, Gnesen; sennomulo Lübeck.

b) de du numeroj: Gustav Balbig, Reichenau (Saksujo); M. Bartholomé, Essen; Franc. Broz, loko?; S-ino M. Hankel, Dresden; Franz Mayer jun., Goldenöls (Bohemujo); Nauber, Gera (Reuss); A. Neitzel, Hannover; Alphons Noll, stud. phil., Münster i. W.; Joseph Sahler, Münster i. W; F-ino Grete Schweitzer, Hannover; F. Simmank, Meissen; F-ino Martha Trötschel, Frankfurt a. O.; Oskar Vogel, Dresden.

c) de unu numero: Florfabrikanto Hermann Dürr, Sebnitz; instruisto A. Harprath, Godesberg; F-ino Ida Reinsch, Dresden.

*

La premioj estas gajnitaj per loto de: S-ro gimnaziano Karl Decker, Gommersheim; F-ino Margarete Lachmund, Leisnig (Saksujo); S-ro Chr. Sewing, Duisburg.

Fondinto: J. Borel; responda redaktoro: F. Ellersiek, ambaŭ en Berlin. — Esperanto Verlag Möller & Borel, Berlin.
Presejo de Möller & Borel, G. m. b. H., Berlin.